

# FLANDRA



# KATOLIKO

MAANDSCHRIFT VAN HET  
KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND

UW REISDAGBOEK

gevaert  
PANCHROMOSA  
ROLLFILM

Te koop in alle landen

Beter en sneller dan een potlood teekent  
Panchromosa uw reisindrukken op.

ZEER KLEURGEVOELIG  
BRILLANTE GRADATIE  
GROOTE BELICHTINGSSPEELRUIMTE  
PERFECT ANTI-HALO

**PANCHROMOSA GEVAERT**  
ROLFILM • FILMPACK • LEICA FILM

FUKE-leden uit het Antwerpsche!

Voor uw \_\_\_\_\_

**Heeren- & Kinderkleeding**

GEMAAKT EN NAAR MAAT

is het beste adres:

**J. PAESMANS**

**IN 'T DUIFKEN**

Koepoortstraat 64, Antwerpen. - Tel. 217.51

5 % AAN ONZE LEDEN !!

LIKEURSTOKERIJ

**DE RAAF**

■ ALLE SPECIALITEITEN ■

ALLE GEKENDE WIJNEN

**J. VANDEUN-JESPERS**

TURNHOUTSCHE BAAN, 277

BORGERHOUT (ANTW.)

JAARGANG 3 (6)

Nr 7

JULI 1938

# FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET  
KATHOLIEK VLAAMSCH  
ESPERANTO - VERBOND



MONATA REVUO DE LA  
FLANDRA UNUIĜO DE  
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

K. V. E. V.

F. U. K. E.

Redakcio: Patro C. v. Hoogstraten, O. Praem., Abatejo Grimbergen. (B)

Interŝanĝ-adreso: F. U. K. E., Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout.

Abonoprezio: 15 fr. Kun membreco FUKE kaj IKUE 20 fr. Abonoprezio por eksterlando 20 fr. P-konto 412.354 K.V.E.V. Aalst

## FLANDRA UNUIĜO

**DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ F. U. K. E.**

**Kath. Vlaamsch Esperanto Verbond K. V. E. V.**

**Voorzitter:** Lic. Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst. **Ondervoorzitter:** Dr Marcel Naster, Naamsche straat 113, Leuven. **Proost:** E. H. A. Beckers, Professor, Normaalschool, Mechelen a. Maas. **Secretaris:** J. Van Deun, Turnhoutsche baan, 277, Borgerhout. **Kassier:** K. V. E. V. Aalst, P-konto 412.354.

### PROVINCAJ KAJ LOKAJ DELEGITOJ:

#### Antwerpen

ANTWERPEN	E. Paesmans, Koepoortstraat, 64, P-konto 4145.89
EDEGEM	R. Torfs, Verbindingstraat, 9
EKEREN	J. Van Gulck, Zuster Nathalielaan, 7
GEEL	M. Gordon, kleermaker, Statiestraat, 3
HOBOKEN	J. De Groot, onderwijzer, Caronstraat, 31
MERKSEM	H. Versavel, Bredabaan, 785
MOL	F-ino M. Bergmans, Markt, 19
Ste MARIABURG	Joz. Cammaert, Van de Weygaardlei, 12, P-konto 4274.93
WILRIJK	D. Mortelmans, E. Segerslaan, 14

#### Brabant

GRIMBERGEN	E. H. Canisius van Hoogstraten, o. praem., abdi
LEUVEN	Petro De Fraye, Fred Lintstraat, 164, P-konto 4427.19

#### Limburg

BREE	H. Beelen, professor, College
HASSELT	A. Tournel, Guido Gezellestraat, 5
St TRUIDEN	Jean Put, Kasteel van Duras

#### Oost-Vlaanderen

GEERAARDSBERGEN	C. Bernaert, Pelgrimstraat, 1
GENT	M. De Valck, Meulestedesteenweg, 487

#### West-Vlaanderen

BLANKENBERGE	Fr. De Zutter, Wetstraat, 101
BRUGGE	F. Roose, G. Gezellelaan, 15
LEDEGEM	F-ino Quagebeur, Statiestraat, 39
LICHTERVELDE	Kam. Ferijn, Wetstaat, 47
OOSTENDE	Maurice Hessens, Blauw Kasteelstraat, 86
ROESELARE	H. Braekevelt, Statiedreef, 177

## TOLEREMO

Unu el la plej bezonataj kvalitoj en la mondo estas pacemo, toleremo.

Sed toleremo kaj pacemo estas aferoj kiujn multaj miskomprenas. Tiel ekzemple iu persono iam demandis al ni, kiel estas eble, ke ni katolikaj Esperantistoj volas la pacon kaj tamen kontraŭstaras la komunistajn ideojn.

La riproĉo ke ni katolikoj estas maltoleremaj ne estas tiel malofta. Oni deziras ke ni katolikoj silente permesu, ke oni disvastigas falsajn teoriojn, faras malmoralajn agojn, kaj eĉ ke oni niajn katolikajn infanojn edukas en senreligiaj (do kontraŭreligiaj) lernejoj, ktp. Se ni tiam ne silentas sed protestas, tiam oni diras ke la katolikoj estas netoleremaj.

Tiu riproĉo ne estas prava. Ni eĉ kuraĝas aserti ke multaj katolikoj estas multe pli toleremaj. Kiam temas pri nia persono, pri privataj aferoj, pri bagatelaĵoj, jes, tiam oni povus esti pli tolerema. Sed kiam temas pri Dio, pri nia Kredo, tiam oni ne diru: mi volas esti tolerema, mi deziras vici en paco, la Kredon defendu la sacerdotoj stp. Ne, ni ne povas silente toleri ke oni atakas nian religion, sed estas nia sankta devo ĉiam kaj ĉie defendi Dion kaj Lian Eklezion. Kaj defendi aferon ne estas maltoleremo.

Sed ni ne nur devas defendi nian religion sed ankaŭ konatigi kaj disvastigi ĝin. Kristo ja volas ke ni laboru por ke estu unu ŝafejo kaj unu paŝtisto, kaj tion

ni ne povas fari silente kaj ĉion tolerante. Disvastigi ion, ankaŭ tio ne estas maltoleremo.

Sed el la devo defendi kaj disvastigi nian Kristanan religion, sekvas ke ni devas ankaŭ batali kontraŭ la malbono ĝenerale, kiu estas kontraŭa al Dio kaj religio. Oni ne perdu el vido ke bono aŭ malbono ne estas io subjektiva, dependanta de la opinio de iu persono sed estas vere objektiva. Tiel ekzemple, malmoraleco estas objektiva malbono, ankaŭ por tiuj kiuj volas ĝiti.

Rilate al la ĝenerala malbono ni estas plenrajte maltoleremaj, ĉar ni devas batali por la vero, la bono, kaj ne nur defendi ĝin. Kristo diris: « Mi venis por alporti fajron kaj Mi volas ke ĝi brulu ». Tiu fajro ardu en niaj koroj kaj venu eksteren tiel ofte kiel ni povas defendi, konatigi aŭ disvastigi la Kristanan religion.

Kristo diris ankaŭ: « Mi ne alportis la pacon sed la glavon ». Kion tio signifas? Nur ke Kristo nek alportis nek volas indiferentecon, toleremon koncerne la malbonon sed ke Li volas la batalon kontraŭ la malbono, unue kontraŭ la malbono en ni mem kaj poste kontraŭ ĝi en alinloj. La glavo de Kristo ne estas glavo por mortigi la homojn, kiujn ni devas ami kaj kompati kiel niajn tratojn.

Ankaŭ tion oni miskomprenas: se ni batalas kontraŭ la malbono, ĉu agoj ĉu doktrinoj, tiam ni ne malamas la homojn sed nur iliajn malbonajn agojn aŭ doktrinojn.

Oni diras : oni devas estimi la opinion de ĉiu homo. Tio estas vera, se oni intencas diri ke oni estimu la *homojn* pro ilia *bon-intenca opinio*, kaj tio estas entute laŭ Kristo, Kiu malpermesis juĝi pri la konscienco de la homoj. La bonan intencon oni devas ŝuĝi. Sed se oni intencas diri ke oni devas estimi la *opinion mem* de ĉiu ajn kaj respekti ĝin, ne kontraŭstarante, kvankam oni scias ke tiu opinio estas falsa, tiam tiu eldiro estas 100 % senseca. Oni, ja, ne povas respekti ion falsan.

Ankaŭ inter la Esperantistoj ekzistas multaj malsanaj partioj, opinioj. Sed kvankam ni ne estimas ilian falsan doktrinon rilate al religio ktp. ni tamen povas kunlabori kun ili, se temas pri la devastigo de Esperanto por la ĝenerala bono de la homaro. Sed por tio ni ne ĉesas defendi kaj devastigi nian religion kaj batali kontraŭ la malbono. Laŭ kelkaj neŭtraluloj ni devus silenti se « neŭtralaj » kongresoj, konferencoj, gazetoj ktp. agas kontraŭkatolike, do ankaŭ ne neŭtrale. Por konservi la pacon ni devus permesi ke oni sub la nomo de « neŭtraleco » faras aŭ subtenas ĉion, ne nur ĝeneralan bonon sed ankaŭ *objektivan malbonon*. Oni volas ke ni toleru ĉion de ili, tial ke, se ni protestas, ni malutilas al la ĝenerala Esperantomovado. Sed ili pripensu ke unu el niaj katolikaj principoj multe pli valoras ol la tuta Esperantomovado. Se ni devus elekti inter devastigo de Esperanto kaj defendo de niaj kristanaj principoj, ni senhezite elektus la lastan. Esperanto estas farita por servi kaj ne por esti servata.

La amoleĝo de Kristo ne enhavas ke ni restu pacemaj rilate al la malbono, ke ni estu suloj, por kiuj ĉio estas bona. Per akcepto de la Sankta Konfirmo ni fariĝis soldatoj de Kristo kaj havas do la taskon batali por Li. Ni devas batali por Li ĉiam kaj ĉie nedirekte per nia ekzempla konduto, kaj *subzone ankaŭ direkte per agoj kaj vortoj*. Sed bedaŭrinde vere estas, ke multaj katolikoj estas tro toleremaj, tro pacemaj, eĉ indiferentaj. Kelkaj estas tiel toleremaj ke ili por mono aŭ imaga honoro forlasas siajn kristanajn devojn, tiel toleremaj ke ili pro ĝentimo akceptas viandon en la abstinencotagoj kiam oni antaŭmetas ĝin al ili ; tiel pacemaj ke ili ne protestas, se oni en ilia ĉeesto atakas la religion, la sacerdotojn, kaj la plej gravajn kristanajn devojn ; tiel indi-

ferentaj ke ili kvazaŭ senkonscie abonas gazetojn kiuj ne respektas iliajn plej sanktajn bonojn. Sed la vera nomo de tio ne estas toleremo aŭ pacemo, sed perfido, malkuraĝo, suleco. Tiuj nomkatolikoj estas kaŭzo, ke oni ofte ne sufiĉe respektas nin katolikojn. Ni ne forgesu : *ni ne estas la Eklezio toleranta, sed la Eklezio batalanta*.

C. v. Hoogstraten O. Praem.

**I**nternacia **K**atolika  
**U**nuigŝo **E**sperantista

### Jarlibro IKUE 1938

U hebt het ontvangen jaarboek van IKUE 1938 niet noodig ? Stuur het dan terug naar ons sekretariaat en zet achter uw naam de letters Fl. B. of P. M. indien U in ruil voor uw jaarboek de « flava broŝuro » of de grammatiko P. Maasen verlangt te ontvangen.

### Espero Katolika

De leden van FUKK zijn ook leden van IKUE en lezen dus het officieel orgaan van IKUE. Espero Katolika, dat rijk geïllustreerd is en internationaal van inhoud.


Espero Katolika geeft elke maand puzzles met prijzen. Ieder abonnee heeft recht op een kosteloze aankondiging. Toch is de prijs slechts 24 fr.

Abonneer U aanstonds en stort 24 fr. op postrekening nr. 209.034 van L. Calloens, Aalst.

### Averto

*Ni atentigas niajn anojn al la fakto ke S-ro Robert Loecx el Bruselo estas simpla ano de FUKK kaj estas nenikaze rajtigita agi en nomo de nia estraro aŭ de nia organizo por iu ajn propagando aŭ kuntabulado en la grupoj aŭ komunumoj.*

La Estraro.



## UNUA EŬKARISTIA ESPERANTO MONDKUNVENO

PAPA BENO POR LA ESPERANTISTOJ

Kvankam la politikaj cirkonstancoj kaj mensogoj de la malamikaj gentoj de hungaraj senteble malpliigis la nombron de partoprenantoj, tamen la unua mondkunveno ĉiurilate bonege sukcesis. Jam la 20an de Majo dum la interkonatiĝa vespero en centra laktejo en Urba Ĝardeno estis vigla vivo, kiu dum la du solenaj kunsidoj kaj dum la solena Eŭkaristia Vespere forte altiĝis. La unua kunsido okazis la 27an, prezidis P. Francisko Zsiros, prelegis Dr. Francisko Erdey, tit. univ. prof., papa ĉambelano, konsulo de HEF, pri : Vinculum Caritatis (Ligilo de la amo) ; Monsinjoro Ju-Pin, apostola Vikario de Nanking (Ĉinujo), pri : Eŭkaristio, la socia repaciĝo ; P. Dr. Modesto Caroli el Italujo pri : Eŭkaristio kaj la familio ; Paŭlo Dolak, kanoniko el Slovakujo, pri : Eŭkaristio kaj la mondpaco ; fermis la kunsidon Dr. Aŭgusto Marzell, profesoro. La dua kunsido okazis la 28an de Majo, malfermis Jozef Mihalik, profesoro, prezidanto de HEF, pri : Kiu estas la devo de partoprenintoj de nunaj kunvenoj ; P. Caroli daŭrigis sian prelegon ; Huberto J. M. Eras, paroestro el Nederlando, pri : Eŭkaristio kaj la Agado Katolika ; P. Dr. J. B. Kao el Ĉinujo, pri Eŭkaristio kaj la ĉina misio ; Johano Földi, dir. de burĝa lernejo, konsulo de HEF, pri : Katolika Mondkoncepto. Fermis la kunsidon Dr. Julio Lajos kanoniko el Pécs konsulo de HEF.

La kunvenoj akceptis la proponon por agadi por la enkonduko de la Esperantoinstruado en la lernejojn, salutis telegrame la Sanktan Patron en Romo.

Oni elektis prezidanto por konstanta komitato por estontaj Eŭkaristiaj Esperanto Mondkunvenoj Dr. Fr. Erdey.

La 23an de Majo vespere okazis vere brila solena Eŭkaristia Vespere kun riĉa programo precipe la religia teatraĵo de Maria

Blasko kaj poemaĵo de Kalocsaj estis multvaloraj. Ĉiutage okazis Esperantlingvaj predikoj en la preĝejo de la Jezuitoj (la S. Meŝoj kaj predikoj estis farataj de : E. Sebestyén, religia prof. ; P. F. Zsiros, Mons. Ju-Pin, Dr. Fr. Erdey, P. Dr. J. B. Kao, Julio Lajos kanoniko kaj Ladislao Németh paroestro).

Sekve de la klopodoj de ĉefinspektoro Stefano Zöldy, la hungara poŝto uzis la Esperantan lingvon ĉe telefoninformservoj, kaj ĉe la telefonaparatoj. La budapeŝta fremdultrafika oficejo eldonis belan bildprospekton pri Budapeŝto.

La Katolika Esperanto Societo, kiun helpis ankaŭ HEF, meritas dankon pro la bon-sukcesintaj laboroj. La Mondkunveno nepre devas porti bonegajn konsekvencojn por la Esperantomovado, se mem la Esperantistoj ne fuŝos ĉion per ilia maldisciplino kaj interbatalo. Tiu nuna Eŭkaristia Esperanto Mondkunveno pli valoras ol dek tiel nomataj Universalaj Esperanto-Kongresoj, ĉar pri la unua ekatentis ĉiu katoliko, dum pri la aliaj ne interesiĝas eĉ mem la Esperantistoj.

Kun ĝojo ni sciigis, ke la Papa Moŝto dankis telegrafe la saluton kaj sendis sian benon por la Esperantistoj. La kunsidojn partoprenis 400 personoj el 12 landoj.

Laŭ Hungara Heroldo.

Ni tamen kredas ke la sukceso estus pli granda, se la Esperanto subkomitato estus laborinta pli akurate. Kvankam ni direkte interrilatis kun la komitato, tamen ni ne ricevis la *plej interesajn* kaj eĉ la *plej necesajn informojn* sufiĉe frue por sciigi tiujn al la flandraj partoprenantoj. Krom tio estas personoj, eble relative multaj, kiuj volis partopreni al la Esperantokunvenoj kaj eĉ antaŭe aliĝis, sendante la 4 petitajn respondkuponojn, sed kiuj veninte en Budapeŝto ne ricevis iun dokumenton nek unu informon.

Ni esperas ke la Esperantokomitato de la estontaj Eŭkaristiaj kongresoj prizorgos la aferojn pli akurate. (N. d. l. R.)

Esperantoinformservo ĉe la hungara Poŝto.

Okaze de la Eŭkaristia Kongreso la hungara poŝto eldonis seslingvan poŝtan informilon, kiun ĝi disdonis senpage. Unu el la ses lingvoj estas Esperanto. En la poŝtifi-

cejo Budapest 53 (apud la Baziliko) deĵoris de matene ĝis vespere seninterrompe Esperanton parolantaj gepostistoj. Krom tio la hungara poŝto starigis Esperanto telefonan informservon. La telefona informservo ankaŭ esperantlingve donis informon pri la tempo kaj loko de la solenaĵoj, pri la trafika ordo de la elektrotramoj, aŭtobusoj kaj dentrada fervojo; pri la loko, tempo kaj enŝirprezo de amuzejoj kaj ekspozicioj; ĝi laŭdezire sciigis la telefonnumeron de hoteloj, aŭtogaraĝoj kaj de la nokte deĵorantaj apotekoj, krom tio la manieron plej mallonge atingi stratojn kaj placojn.

*Perado de informoj.* Ĉiu povis dikti en ĉiun telefonaparaton (ankaŭ en publikajn, stratajn, staciajn) Esperantlingve por kiu ajn (ankaŭ por neabonantoj) al nomo aŭ al devizo adresitan informon. La poŝto laŭtleĝis tiam la sciigon al tiu kiu sin anoncis, per la telefonnumero de tiu servo, kun nomo aŭ devizo. Tiuj informoj povis konsisti maksimume el 10 vortoj.

### De Vlaamsche Kampeercentrale en Esperanto.

Naar aanleiding van de tentoonstelling van de VKC in het eenig mooie stadspark van Aalst, trad onze voorzitter Lic. L. Calloens als spreker op, in een speciaal opgerichte tent, om aan de kampeerders het belang van een internationale taal ook voor hun doeleinden aan te toonen, daar zij als toeristen niet alleen met de natuur in voeling moeten komen, doch ook met de menschen, met hun gewoonten en zeden, sympathie moeten opwekken voor ons volk en de folkloristische gebruiken leeren begrijpen.

Alleen Esperanto kan ook hier aan beide zijden 'n volledige bevredigende oplossing brengen. De spreker die ingeleid werd door den heer R. De Kegel, afgevaardigde van het wereldverbond der Esperantisten, werd door warme toejuichingen bedankt voor zijn degelijke uiteenzetting.

### Esperanto op de vijfde plaats tusschen 31 talen.

Het grootste Joegoslavische dagblad « Politika » gaf in zijn kolommen kursussen van

Fransch, Duitsch en Engelsch. Na het einde van die kursussen opende het blad een onderzoek om te weten welke taalkursussen de lezers in de toekomst verlangden. Elke lezer kon stemmen voor drie talen. Wij geven hier de volledige uitslag van die stemming.

Italiaansch : 7.035 ; Russisch : 6.461 ; Tsjechisch : 4.263 ; Spaansch : 2.918 ; Esperanto : 1.222 ; Bulgaarsch : 1.170 ; Hongaarsch : 1.024 ; Poolsch : 504 ; Grieksch : 497 ; Turksch : 432 ; Roemeensch : 430 ; Japaneesch : 173 ; Zweedsch : 121 ; Sloveensch : 114 ; Chineesch : 81 ; Nederlandsch : 73 ; Albaneesch : 47 ; Araabsch : 41 ; Portugeesch : 39 ; Hebreeuwsch : 35 ; Deensch : 33 ; Baskisch : 19 ; Finsch : 17 ; Litausch : 13 ; Indisch : 9 ; Noorsch : 8 ; Perzisch : 5 ; Afghaansch : 3 ; Lujic-Servisch : 2 ; Latijn : ? ; Sanskriet : ?

Het aantal stemmen dat Esperanto bekwaam is des te merkwaardiger als men weet dat de redaktie van « Politika » Esperanto niet genegen is en ook bedoeld had het bij de stemming uit te sluiten.

De redaktie wilde zelfs het juiste aantal stemmen voor Esperanto niet meedeelen, maar zeide slechts dat het meer dan 1000 was. Meer dan duizend is 1050 maar kan ook 1900 zijn, dat hangt af met welke bedoeling het gezegd is. In dit geval mogen we veronderstellen dat de redaktie het juiste getal heeft verzwegen, omdat het te groot was volgens haar. Het is dus misschien aannemelijk meer dan duizend, zoodat we gerust mogen aannemen dat Esperanto de plaats bekwaam tusschen het Spaansch en Bulgaarsch.

Deze keus geeft een interessante kijk op de achting die de Joegoslaven voor de verschillende talen hebben.

(Volgens Heroldo).

VOOR UWE

**Parketvloeren, Linoleums,  
Meubelen en Marmers**  
VRAAGT DE ALOMGEKENDE  
**BOENWAS GLIMO**

**Firma Corstiaens - Neefs**  
St-Antoniusstraat, 12-14. Antwerpen

## VRAAGT EN LEERT

*No 19. L. C. en A.* In Juna Vivo ontmoete ik de uitdrukking: mi sentas grandan respekton antaŭ li. Is dat geen Nederlandisme?

*Antw.* Antaŭ mag slechts gebruikt worden om plaats of tijd aan te duiden. In de uitdrukking: eerbied hebben voor iemand, duidt voor een betrekking aan die gaat van iemand tot iemand, de richting a.h.w. van den eerbied. In dergelijke gevallen wordt voor in Esperanto vertaald door al; respekto al, estimo al, amo al, enz.

*No 20. D. M. en W.* Men ziet dikwijls *nescii* in plaats van *ne scii*. Mag men ne en scii naar believen aaneenschrijven?

*Antw.* Daar het feitelijk tegen geen enkele regel is en de beteekenis er niet door verandert, mag men die woordjes met elkander verbinden, temeer daar dat reeds gedeeltelijk in gebruik gekomen is. Men is in den beginne misschien onwillekeurig hiertoe overgegaan onder invloed van het Latijnsche *nescio*.

Het is echter geraadzamer ze niet aaneen te schrijven daar dat tegen het gebruik van de nationale talen is, en er dus de duidelijkheid niet kan bij winnen.

Veel afkeurenswaardiger zou het zijn deze gewoonte ook bij andere werkwoorden in te voeren.

BLANKULO.



**APERIS:**

**OPGELET!**

Daar het een *gewetensplicht* is de gevaren voor geloof en goede zeden te vermijden, die vooral *door lectuur kunnen worden in gevaar gebracht*, zullen wij voortaan de indeeling aangeven van de boeken, zoowel in onze recensierubriek, als in onze boekenlijsten.

Bij het koopen van een boek kan men dan

op eigen verantwoordelijkheid oordeelen over de al of niet geschiktheid ervan.

*I = Verboden Lectuur*, Index, tegen Godsdienst of Moraal.

*II = Streng voorbehouden*, mag slechts bij uitzondering *om gegronde redenen*, door *welgevormde* rijpere lezers gelezen worden.

*III = Voorbehouden Lectuur*, mag ondanks zekere passages of grondgedachten, ook ontspanningshalve, door *gevormde* lezers gelezen worden.

*IV = Voor volwassenen alleen*, 18 à 20 jaar en ouder, veronderstelt zedelijke voorlichting en vorning.

*V = Voor allen*, ook voor aankomende jeugd geschikt.

*VI = Kinderlectuur*.

† bij het Romeinsch cijfer geplaatst bet.: met katholieke strekking.

\* bij het Romeinsch cijfer geplaatst bet.: minderwaardig, onpaedagogisch.

N bij het Romeinsch cijfer geplaatst bet.: storend neutraal.

### Muusses Esperanto biblioteko

Prezo de tiuj libretoj 4.50 fr. La serio de 10 volumetoj 41 fr. Abonebla ĉe nia Vendinstituto.

N<sup>o</sup> 11. — LA ORA JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO 1937. — *Arangis J. Glück. 31 paĝoj. (IV).*

Flandra proverbo tekstas « oni ne parolu pri la ŝnuro en la domo de la pendiginto ». Ŝajne la paroladistoj de la Ora Jubilea Kongreso ne konas tiun proverbon: ili parolis pri la interna ideo, pri unueco, ili citas vortojn de Dr Zamenhof en speciala interesa aldono « Pri la Kongreso » kaj ĉio ĉi estas en akra kontrastado kun la realeco: la disigo en la rangoj de la Esperantistoj. Nu, ni esperu.

La paroladoj de Bastien kaj Nylen povas esti historiaj, la versaĵoj de Varma Thilander eble plaĉos al poetoj, sed por mi la du paroladoj de Glück estas plej interesaj, ĉar prizorgitaj laŭ literatura vidpunkto, kvankam ankaŭ li en belaj frazaroj provas defendi la homaranismon, kion ni katolikoj

komprenoble forĵetas. Ankaŭ okazas kunpuŝigoj: ni katolikoj ekzemple akceptas la opinion ke laŭ Glück: 1° Zamenhof estas personiĝo de estimo kaj amo al ĉiu alireligiulo. 2° ke lia fundamenta postulo estas, ne enmiksi en la Esperantomovadon: demandojn politikajn, diskutojn naciajn, kaj disputojn religiajn, ĉar « Esperanto estas delikata floro kiu en ĉi tiu trio velkus, eĉ pereus », sed ..... ni konsideras la altrudon de la homaranismo kiel disputon religian. Kaj, ĉu oni per la Esperantomovado celas ke ni katolikoj kaŝu nian katolikecon? Neniam! Eĉ se pro tio Esperanto devus pereji, sed tio ne okazos, ĉar ni katolikoj, per nia agado vekas simpatian por Esperanto, ĉar ni katolikaj Esperantistoj havas duoblan idealon, kiu iras saman vojon, la nekatolikaj Esperantistoj komprenu tion.

Resume: leginda libro por esti informata pri la Esperantomovado.

COLO.

N° 12. — NORDNORDAJ FABELOJ de Joël Thézard. *Ilustrita per 5 desegnoj de la aŭtoro, 32 paĝoj. (V).*

Thézard kapablas rakonti en vivaj koloroj, sed aliflanke ni bedaŭras ke li nur fragmente verkas, ofte nur faras skizon, kvankam ni sentas ke li kapablas havigi al ni belan altnivelan pentraĵon literaturan, pri kiu ni, esperantistoj, fierus, kiel ni, flandroj, fieras pri verkoj de Rubens. Lia rakonto pri Piĉak, la laponido, tre similas al la legendo, kion mi legis en « Legendo de Topelius », eldonita de Davidsfonds. Dum la rakonto pri Skop, « la fokido beleta-malgrandanigra-besto-kies-okuloj-estas-perlokoloraj » kondukas nin en la atmosferon de R. Kipling kiam li rakontas pri « la blanka fokido ».

La lingvo, originala esperanto, estas flua, tipa — knickers li nomas ludpilketoj el marmoro, — kaj ni esperas ke la « juna » Esperanto-verkisto — li nur antaŭ kelkaj jaroj fariĝis esperantisto, — havigos al ni ankoraŭ multajn vojaĝimpresojn aŭ tutan romanon en tiu sama stilo hejmecca, legendecca kaj delikata.

N° 13. EN LA VAGONO de Ivan Širjajev. *Originala rakontaro, 29 paĝoj. (IV).*

Eĉ nekonante la nomon aŭ la naciecon de la aŭtoro, oni tuj divenas ke li devas esti spirita frato aŭ kuzo de Gogol: la sama in-

termikso de vera slava emo por tragediuj kaj humuraj situacioj kaj priskriboj.

Tipa, interesplena literaturo, kiu per belflua lingvo kaj emociiga rakontkapablo nin kaptas kaj enkondukas dum kelkaj horoj en la fantazian mondon de la aŭtoro: en vagono de fervojo, en militkaptejo kaj en sorĉita loko.

La leganto ĉiam en la Muusses libreto bedaŭras ke li jam alvenis ĉe la fino. Esperu ni ke la disvastiĝo de la Serio ebligos baldaŭ la eldonistojn havigi por la sama prezo duoble pli ampleksan volumon.

La lingvo estas plaĉa, iom nekutima ie kaj tie; nur 1 preseraro.

COLO.

N° 14 — 15. LA PROBLEMO DE LINGVA INTERNACIA, de Dro Björn Collinder. *Publikigis Paul Nylen. (IV).*

Kiel ĉiam belaspekta, ĉiŝoje duobla volumeto, 63 paĝoj, do duobla prezo: 9 fr.

Jen certe unu el la plej interesaj eldonoj pritraktantaj laŭ scienca vidpunkto la problemon de lingvo internacia. La aŭtoro estas certe eminenta profesoro en la kompara lingvoscienco, kaj liaj okazaj pritraktoj de la flandra lingvo jam montras al ni ke li estas fidinda kaj informita, io kio ne ofte veras rilate al nia lingvo eĉ ĉe filologoj eksterlandaj. Mi ŝatus citi kelkajn partojn el tiu ege leginda libreto, sed nia ĉetredaktoro eble grumblus ĉar jam mankas al li loko por aliaj komunikoj. Mi do nur menciuj kelkajn ĉapitrotitolojn elokventajn: La hindoeŭropaj lingvoj. Naturaj kaj artaj elementoj de lingvoj. Pruntvortoj. Lingvomikso kaj mikslingvoj. Esperanto en la purgatorio de la kritiko.

Du interesajn faktojn li pravas en sia disertacio:

1. Gramatiko preciza kaj detala kreis ordigitan lingvon, kiu post 2500 jaroj ankoraŭ nun estas skribata kaj parolata kiel ĉe ĝia kreado: estas la sanskrito.

2. Ĉiuj lingvoj naturaj havas tiom aŭ pli da artefaritaĵoj en si ol Esperanto: pruntvortoj, miksvortoj, afiksoj artefaritaj, pensu pri la hemiistoj kiuj uzas la finaĵojn -ur, -id, -at, -it, per-, en tutspeciala senco.

Lia konkludo: eĉ se Esperanto havas mankojn, ni akceptu ĝin kaj poste, kiam Esp. estos akceptita de multaj ŝtatoj, ni korektu tiujn mankojn. La nekutime malfacila

temo estas pritraktata en tia klara stilo ke oni neniam dubas pri la senco de la frazo; nur la ideoj postulas kaj valoras dufojan legadon kaj jam el tiu vidpunkto la libro estas argumento pri la taŭgeco de Esp. por la scienca mondo.

COLO.

N° 16. ROZINJO de Gyula Török. *El la hungara originalo tradukis K. Kaloesay. 39 paĝoj. (IV).*

Mi tuj diru ke la traduko de K. Kaloesay aspektigas la rakonton kiel originalan verkon malgraŭ liaj neologismoj, kiel *koĉero* por veturigisto, k. a.

La rakonto mem montras al ni la por ni strangan hungaran animon, iom supraĵan laŭ unua aspekto. (Rozinjo dancis la ĉardason dum 4 horoj?) sed aliflanke ni plensentas la malesperigan influon de la tragedia vivpriskribo pri Rozinjo kiel de cigana muziko, al kiu ni Okcident-Eŭropanoj, ne kapablas alkutimiĝi sen ia kora maltrankviliĝo. Ne estas rakonto slava aŭskultata dum longa vintrovespero, sed estas travivado de luktoj inter homaj pugnoj, koroj kaj avidoj ĉirkaŭ la eta, silentema Rozinjo, kies animon la aŭtoro de tempo al tempo malkovras al nia kompato, miro aŭ admiro.

Fakte ne ripoziga legaĵo, sed ĉu la romantiko ne estas praa por ni, dudekjarcntuloj? Nur 1 preseraro.

COLO.

N° 17. EL LA LONDONA SKIZLIBRO de Ch. Dickens. *El la angla lingvo tradukis Fred Wadham. 32 paĝoj. Plaĉa aspekto (V)*

Mi ne plu ŝatus la aŭtoron Dickens. (kvankam mi iam tradukis flandralingven lian belan « Cricket on the Hearth ») de kiam mi legis lian « Historion de Anglujo » por infanoj, en kiu li montriĝas fanatikulo, kaj de kiam eliris, ankaŭ en Esperanto bedaŭrinde, lia Historio de Jezuo, Kiun li konsideras kiel grandan profeton sen pli.

Feliĉe la simpatia tradukinto Fred Wadham, kiu iam tiel afable oferis sian helpon por solvi la organizan kaj ligan problemon de la Esper. movado en nia lando, iom mildigis mian koron kaj mi diris al mi mem: legu tiun londonan skizlibron kaj vi rememoros pri Pickwick Papers k.s. en kiu abundas tiu fama angla humuro kaj vortludado, kiuj tamen iom vualiĝas en kiu ajn traduko, kaj pri kiuj ni havas pli belan ekzem-

plon en Jerome K. Jerome. (Tri homoj en boato).

Kiel la tradukinto nin avertas, la stilo estas iom peza, sed pri tio nur kulpas Dickens mem kaj liaj samtempoj, kaj estas ja esenca parto de liaj humoraĵoj, ekzemple la oftaj rediradoj aŭ la kvazaŭ simplanima naiveco de la aŭtoro.

La traduko estas senriproĉa, nur 1 preseraron mi trovis. La rakontoj titolas: La 4 fratinoj. La apuda domo. Kristnaska festo.

COLO.

SLOSILO DE L'INTERNACIA FILATELISTA KORESPONDADO. *Eldonis: Esperanto-Presejo, Antonio Prazak, Jablonné n. Orl. Ĉeĥoslovakujo. 68 paĝoj.*

Slosilo de 77 kutimaj tekstoj en la sekvantaj lingvoj: Esp., ĉeĥoslovaka, germana, franca, angla. En la 4 de mi konataj lingvoj la frazoj estas korektaj kaj plifaciligas la interrilatadon por multaj filatelistoj. La prezo, 7 fr. estas iom alta, sed uzantoj ne bedaŭros la elspezon.

LA MILITO EN EKSTREM-ORIENTO. de Mgr. Paŭlo Ju-Pin, episkopo por Sozusa. *Apostola Vikario en Nankin. (V).*

Kun antaŭvorto de la konata Sacerdoto Dro J. B. Kao. Estas pledado sub la devizo « Senkulpa sango » pri la nekulpeco de la ĥinoj rilate al la nuna milito. Baziĝas la broŝuro sur multaj oficialaj tekstoj: La kontrakto de la 9 Potencoj kaj la Kontrakto de Parizo estas tuttekte represitaj. Ankaŭ letero de nia Sankta Patro PIO XI.

COLO.

DE SPIJKER OP DE KOP GESLAGEN. *Uitgave van de Nederlandsche Bond van Roomsche-Katholieke Esperantisten. Prijs: Fr. 2.50. (V†)*

Door onze zustervereniging Nederlandse Katholiek werd een stemmig boekje uitgegeven met bovenstaande titel en als ondertitel « Praatjes van Nico Hoen, Plaatjes van Jan Westen ». Ook ons Verbond heeft er belang bij dit boekje, waarin het Kath. VI. Esp. Verbond trouwens met al zijn diensten vermeld staat, te verspreiden onder katholieke belangstellenden die soms nog met opwerpingen of vooroordeelen te kampen hebben, als: noodzakelijkheid eener Internationale Taal, gevaar voor de nationale taal, Esperanto is artificieel, nut voor het Katholiek Geloof,

wat anderen doen, nut op onderwijs-gebied, organisatie der kathol. op internationaal gebied, nut der congressen, consuls, plaatselijke afgevaardigden. kort overzicht der taal.

In één woord, het boek, 32 bladzijden, om in handen te geven van ieder die het goed meent en katholieke actie wil steunen.

Eén bemerkning: de spelling Marchant hindert ons soms waar we lezen over « enige grote mensen », doch dit is maar het uiterlijke van uitstekend diepgaande gedachten. Ook zullen wij, Vlamingen, er in bevestigd zien wat de schrijver zelf zegt « Esperanto zal beletten dat vreemde talen ons eigen taal verbasteren ». Wij, Vlamingen, kennen die verbastering en vechten er tegen. De Noord-Nederlanders zijn er wellicht niet zoo van bewust: de tekst wemelt van uitheemsche uitdrukkingen. Of is het gewild tendentius? Hindert niet! Het boekje mag er zijn, en moge het 2000 bekeeringen verwekken.

L. Calloens, Voorzitter KVEV.

DION ADORI. *Poemaro de B. Fmaria Ha de Vernyi. Luksa eldono, 64 paĝoj, Prezo: 13 fr. (IV †).*

Ni certe jam havis poetojn, kiuj kapablas uzi nian lingvon por plej profundaj sentesprimoj, sed ĝis nun mi ne legis tiel impresan poemaron kiel « Dion Adori », de vera talenta eksterordinara verkistino, kiu laŭ plej moderna aŭ pli bone plej persona maniero esprimas sentojn en versoj sen ritmo, en frazoj sen interpunkcio, kiuj kelkfoje impresas kiel recitado de lamentadoj Jeremiaj en Norbertana abatejo dum la Sankta Vendredo-Ofico. Aŭskultu kaj juĝu mem:

Ĝis morgaŭ en krepusko de vakskandeloj  
en tombaj odoroj de silento

pentofarantino  
en plej posta katedralo  
kiel impostisto  
frapante mian bruston  
ni genuos  
pentofarantino  
de gotika kolonaro  
kandelo estingita de ekbrilo nokta  
..... oferon ne havante.

Stranga, streĉa, emociiga verko, kiu oni devas legi nokte dum ke ĉio ripozas silenta, kaj nur la steloj briletas en la ĉielo serena, por en agordo kun la seneliganta ekstaza animo de la verkistino, Dion adori.

La teksto klariga en diversaj lingvoj estas erarplena. La poemaro mem prezentas ie kaj tie ankaŭ preserarojn, kiuj despli ĝenas ke la manko de interpunkcio jam malfaciligas sekvi la fadenon de la alten flugantaj ideoj kaj sentoj. Strange ke ftizuloj tiel ĝisfunde kapablas eligi sian animon, ni pensu pri Paul Van Ostayen aŭ Alice Nahon ĉe ni, kvankam tiuj tute ne similas al B. Fmaria Ha de Vernyj.

Ŝi uzas belan lingvon kvankam ankaŭ Idovortojn kiel « tristo » malĝojo; senso, zintuigen, k. a.

Fine mi diru ke la verkistino estas katolika kaj profunde pia, kvankam la erotiko, kiu tamen ne impresas kiel sensualismo, ankaŭ indikas ke ŝi estas persono kun korpo kaj animo, sed tiel delikata: « kiel ventetoj ĉarmaj estas ektuŝoj liaj ».

Ni danku Literaturan Mondon pro tiu 67a libro, dediĉita al katolika verkistino kaj..... akiru ĝin!

COLO.

### ESPERANTISTOJ!

Ĉiam konsultu por viaj vojaĝoj

### «Ultra Montes»

La plej belaj vojaĝoj je la plej avantaĝaj kondiĉoj.

Ultra Montes, a. s. Antverpeno: 46  
Korte Nieuwstr. Tel. 276.51 & 303.50.

Bruselo: Nieuwstr. 167. Tel. 17.53.44



EKZAMENTAGO. — FUKÉ organizis la 11an de Majo ekzamenon por la gelernantoj de niaj kursoj. Sin prezentis:

por ekzamemo B: 2;

por ekzameno A: 25 gelernantoj.

La skriban parton gvidis S-roj De Bondt kaj E. Paesmans dum la buŝa parto estis dividita en tri serioj: Sinjoroj L. Calloens — D. Mortelmans; M. Naster — F-ino Goedhart; De Bondt — Van Deun.

La ekzamenlaboro glate kaj kontentige funkciis. Disdono de la diplomoj dum la sekvonta kunveno de S. I. K.

S. I. K.-KUNVENO. — 16-5. — Unua kaj grava punkto de la tagordo estis la disdono de la diplomoj. La Prezidanto invitis la estraron de la Parohaj Lernejoj kaj de K. O. G. Inspektoro J. A. Jespers senkulpigis Lian Moŝton Kanonikan Glenisson kaj S-ro A. Wagemans petis senkulpigon por S-ro Van Dijk, Prezidanto de K. O. G.

Nome de FUKÉ S-ro Van Deun dankis la Komitato de Parohaj Lernejoj kiu ebligis la kurson, kaj la inspektoron Jespers pro la simpatia intereso kiun li montris venante por la disdono de la diplomoj. La gelernantoj ege bone taksis tiun geston. Ankaŭ dankvorto estis donita al la geestraranoj de K. O. G. kiu bonvole akceptis la novan grupon tiel sekcion, kaj metis la ejon je la disdono de S. I. K.

Sekvis la disdono de la diplomoj. Jen la listo de la diplomitoj:

*Ekzameno B kun la Plej Granda Distingo:*  
S-ro J. De Backer, Hoboken.

*Kun Granda Distingo:*

S-ro J. Cammaert, Ste Mariaburg.

*Ekzameno A kun la Plej Granda Distingo:*

S-ro L. Debaene, Antverpeno.

F-ino Magda De Rop, Borgerhout.

S-ro G. V. D. Bergh, Merksem.

S-ro Bryssink, Antverpeno.

*Kun Granda Distingo:*

F-ino Maria De Rop, Borgerhout.

Sinjoro A. Melis, Antverpeno.  
Kapitano Van Geel, Bonheiden.  
S-ro Frans Van Bouwel, Ste Mariaburg.  
F-ino Maria Thijs, Antverpeno.  
S-ro Jos. Goethaert, Borgerhout.  
S-ro Matthijsen, Ste Mariaburg.  
S-ro Hendrickx, Ste Mariaburg.  
S-ro K. Hartman, Antverpeno.  
F-ino J. De Potter, Ekeren.  
S-ro A. De Waele, Antverpeno.  
S-ro L. Driesen, Borgerhout.

*Kun Distingo:*

F-ino V. Goddaer, Oude God.

S-ro G. Janssens, Berchem.

S-ro J. Thijssen, Ekeren.

F-ino Maria Engelen, Borgerhout.

S-ro Jos. Van Bouwel, Ste Mariaburg.

F-ino Van Nieuwenborg, Borgerhout.

F-ino Irma Thijs, Antverpeno.

S-ro A. De Ridder, Bornem.

S-ro Van der Hoydonck, Ste Mariaburg.

Sinjoro Jespers gratulis la diplomitojn kaj esprimis la deziron ke li daŭrigu la laboron por la studado de Esperanto kaj subtenu la katolikan E. movadon. Kvankam li mem. pro manko de tempo ne scipovas Esperanton, li tamen komprenas la gravecon kaj la taŭgecon de la lingvo internacia kaj precipe Li simpatias je ni pro la fakto ke nia movado signifas Internacia Katolika Agado'n. Li fine esprimis la deziron ke sekvantan jaron Sinjoro Calloens. pri kiu li diris laŭdan vorton, denove gvidu kurson, sed tiam superan, dum, se eble aŭ necese, tri aliaj klasoj por komencantaj estos malfermataj.

Pro liaj vere kuraĝigantaj vortoj la tuta ĉeestantaro laŭte aplaudis.

Nome de K. O. G., S-ro A. Wagemans same esprimis siajn gratulojn pro la bela sukceso kiun ĉiuj gelernantoj akiris. Li esperas ke S. I. K. iĝos brila perlo en la K. O. G. krono. Siaflanke K. O. G.-estraro subtenos la junan grupon kaj deziras longan vivon. Aplaudoj.

S-ro Goethaert, Prez. flandra- kaj Esperantlingve dankas la Komitato de Parohaj Lernejoj kaj la K. O. G. pro la simpatio kiun ili montris al la S. I. K. Li esperas ke la grupo restos inda je tiuj favoroj kaj fiere

.. Rookt ..  
**JAMAYCA**  
DE FYNSTE DER SIGAREN

Rijke keus in cigarillos  
Sigarenfabrieken JAMAYCA, Arendonk  
(oni korespondas en Esperanto)

ESPERANTISTOJ!  
Ĉiam konsultu por viaj vojaĝoj  
**«Ultra Montes»**  
La plej belaj vojaĝoj je la plej avantaĝaj kondiĉoj.

Ultra Montes, a. s. Antverpeno: 46  
Korte Nieuwstr. Tel. 276.51 & 303.50.  
Bruselo: Nieuwstr. 167. Tel. 17.53.44

antaŭeniros en la katolika Esperanto movado.

Tiam komenciĝis la grupa kunveno. La Prez. malfermis per la kutima preĝo kaj donis la parolvicon el la Sekretarino, F-ino De Rop kiu laŭlegis la ampleksan raporton pri la fondiĝkunveno. Kvankam juna Esperantistino, ŝi klare kaj flue tion faris, dum la geklubanoj atente aŭskultis.

S-ro Van Deun enkondukis la konversacian lecionon pere de bildo, montranta straton. La lernantoj inter si demandis kaj respondis, ĉu laŭ instigo, ĉu laŭ propra iniciato.

La partopreno al la « san » konkurso estis kontentiga. Rezulto sekv. kunvenon. Novan enigmon donis S-ro Van Deun. Tiuj konkursoj estos premiataj.

Sinjoro Mortelmans klarigis la funkciaĵon de liliĉo de la vendinstituto de FUKĈ en la grupo. Sinjoro J. Primis estos nia filialisto. Li jam enskribis kelkajn mendojn.

Je la 10-a horo la kunveno fermiĝis.

**NOVAJ DELEGITOJ.** — Nia simpatia ano, S-ro P. Mattelaere, apotekisto, bonvole akceptis la delegitecon por Kortrijk.

Ankaŭ nia ano, S-ro De Ridder, kiu jam de kelka tempo vigle propagandis por FUKĈ en Bornem, fariĝis nia delegito por tiu komunumo.

Ambaŭ estu bonvenaj en nia estraro.

**GRATULOJ.** — En la familio de nia membro, S-ro Jos. Goethaert-Jaspers naskiĝis filineto Lutgardis, kaj nia delegito en Loveno, S-ro Petro De Fraye-Coppens, ricevis fileton Hugo. FUKĈ prezentas siajn plej koraĵajn bondezirojn al la feliĉaj gepatroj.

**NOVA SEKCIO.** — En Ste Mariaburg fondiĝis nova sekcio kun la nomo « Katolika Esperanto-Grupo Ste Mariaburg ».

Prezidanto : S-ro J. Mathijssens.

Sekretario : S-ro F. Van Bouwel.

Kasisto-Filialisto : S-ro P. Van der Hoydonck.

Lia sacerdota Moŝto, T. Bogaerts, estas la religia konsilanto. La grupo regule kunvenas kaj, pro la estiĝinta kerno, dum la vintro certe plimultiĝos.

Ni gratulas S-ron Joz. Cammaert, nia delegito por Ste Mariaburg, kiu estas la inicianto kaj ankaŭ la gvidanto de tiu grupo, pro liaj imitindaj klopodoj.

**KONDOLENCOJ.** — En Luik mortis nia

ano S-ro Eugène Bourguignon, onklo de niaj anoj S-roj E. kaj H. Paesmans.

FUKĈ prezentas al la familioj Paesmans kaj Bourguignon siajn plej kristanajn kondolencojn kaj promesas preĝojn por la animiĝo de la mortinto.

**SUBTENO FUKĈ.**

Mi gajnis iom — FUKĈ ricevas iom : M. B.

Fr. 15.—

Jen kelkaj frankoj por la subtena rubriko

Fr. 15.—

**FUKĈ-KUNVENO EN BRUGO.** — Kiel ĉiujare FUKĈ kunvenis aron da anoj kaj simpatiantoj kiuj samtempe partoprenis al la kongreso de Flandra Ligo Esperantista.

Je la 16-a ĉirkaŭe 50 personoj alvenis al ejo « Gildenhuis ». Prezidis la kunvenon : S-ro L. Calloens, prez. de FUKĈ kaj Patro Decoene, prez. de UVEK.

Lia patra Moŝto Decoene malfermis la kunvenon per preĝo.

S-ro Calloens diras bonvenan vorton al la ĉeestantoj kaj rakontas, kiel enkondukis vorton, pri interparolado kiun li havis kun kontraŭ-Esperantisto en la stacidomo de Gent. Estas sperto kiun multaj el ni jam havas, renkontante personojn kiuj miskomprenas la sencon de Esperanto kaj sekve de tio kontraŭstaras ĝin. Pro manko de scio multaj havas tian sintenon rilate al nia lingvo. Estas do nia tasko montri ke Esperanto ne estas la sola ilo por marksistoj aŭ socialistoj sed ke Esperanto por katolikoj havas eĉ pli grandan signifon.

Tiu enkondukita parolado estis por ni ĉiuj bona leciono pri la argumentoj uzotaj en respondo al la atakoj kaj la falsa opinio kiujn tiom da personoj havas. Ni varme aplaudis tiun belan pledadon.

La sekretario laŭlegis la jarraporton. Li diris ke ne multe da anoj scias kian sumon

Al onze leden drinken

**Cichorei De Beukelaar**

want het is de strafste, en daarom de voordeeligste.

Verkrijgbaar in de soorten Fijn-Half grof-Filter

da laboro postulas la vivteno de la unuigo, kiun ni dank' al la sindona kunlaborado de niaj amikoj povas daŭrigi. Konklude li sciigis ke F. U. K. E. pli ol iam bone fartas, kaj ke ni kontentige antaŭeniris.

Pri la interna agado li diris vorton pri nia revuo, kaj klarigis ke pro malfacilaĵoj ni ne regule eldonis nian Flandra Katoliko'n en la lastaj monatoj. Ni baldaŭ esperas venki tiujn malfacilaĵojn kaj la nova eldono estos tiel plibonigita ke niaj anoj certe baldaŭ forgesos la tempan malregularecon. Sub la gvidado de nia nova ĉefredaktoro Flandra Katoliko fariĝos unu el la plej bonaj revuoj en Esperantujo.

En tiu-ĉi jaro niaj amikoj sukcesis helpi nian revuon per subteno kiu sumiĝis 604.95 fr. Egan dankon al ĉiuj ili.

Je Kristnasko, pasintan jaron, F. U. K. E. eldonis la Kristnaska Triptiko'n, laŭ la verko de F. Timmermans kaj kies tradukon prizorgis S-ro Paesmans.

Ankaŭ trafan propagandan broŝureton la estraro eldonis. Ĝi entenas ĉion sciindan pri nia Unuigo.

La raporto estus nepre malkompleta se ne flata vorto estus dirata al la adreso de nia vendinstituto. La estro, ni scias, ne ŝatas tion, sed li almenaŭ permesu al ni unufoje jare diri la veron pri lia agemeco. F. U. K. E. multe ŝuldas al li, kaj plenkore la ĉeestantoj aplaudis.

La gazetservo regule funkciis kaj ni vidis niajn artikolojn en Gazet van Antwerpen, Handelsblad van Antwerpen kaj Morgenpost. Ankaŭ nia propagandservo dissendis sciigojn kaj artikolojn al la loka gazetaro en Flandrujo.

La ekspedservo de nia revuo je ĉies kontenteco funkciis.

Grava fakto por ni estis la starigo de kursoj. En Geel laboris F-ino M. Bergmans, sub ege malfavoraj kondiĉoj. Nia delegitino ricevu niajn gratulojn kaj dankon.

Nia Religia Konsilanto instigis kun sukceso la lernantojn de la Normallernejo de Mechelen a. Maas al la lernado de Esperanto.

En Ste Mariaburg estis S-ro Cammaert kiu jam por la dua jaro gvidis tie kurson. Li ĝojas pro la multnombra lernantaro kaj ni gratulas lin pro la belaj rezultoj, akiritaj de liaj lernantoj en la ekzameno A & B.

S-ro Vermuyten prizorgis kurson en Mortsel.

Fine en Antverpeno la Komitato de Parohaj Lernejoj komisiis nin por organizi Esperanto-kurson. Nia Prezidanto ĝin gvidis kaj ni ne nur devas danki lin pro la 13 foja vojaĝo Aalst — Antverpeno kaj reen, sed ankaŭ pro la rezultoj de lia kurso. Por la ekzameno B sin prezentis du kandidatoj : unu akiris diplomon kun la plej granda distingo kaj la dua diplomon kun granda distingo.

Por la ekzameno A estis 32 gelernantoj inter kiuj :

4 akiris diplomon : Kun la plej granda distingo ;

10 : Kun granda distingo ;

9 : Kun distingo.

Sekvantan vintron ni esperas daŭrigi niajn klopodojn en tiu direkto.

Ni ankaŭ propagandis la Nijmegem-kurson, sekvatan de proksimume 200 gelernantoj.

Fine ni menciu la bonvolemajn anojn kiuj senpage gvidas kursojn por la malsanuloj.

Ĝojiga fakto estis la fondiĝo de 5 novaj FUKĈ sekcioj. Estas en Loveno, Mol, Geel, Ste Mariaburg kaj Antverpeno. Laŭ la aperintaj raportoj ni vidas ke la grupoj bone funkcias.

La estraro kunvenis trifoje : en Novembro en Aalst, en Februaro en Loveno kaj en Majo en Antverpeno.

Novajn delegitojn ni akceptis : en Kortrijk, S-ron P. Mattelaere ; en Mol, Fraŭlinon Bergmans ; en Loveno, S-ron Petron De Fraye ; en Hasselt, S-ron A. Tournel ; en Geeraardsbergen, S-ron Beernaert ; en Oostende, S-ron M. Hessens ; kaj en Bornem, S-ron De Ridder.

En Septembro 1937, Nia Prezidanto faris prelegon en K. V. R. O. kaj aŭdigis 4 diskojn : La Espero, La Tagiĝo, Rigoletto kaj Carmen.

En Vlaamsche Omroep, Loksbergen ni ĉiun semajnon havas nian kvaronhoreton, kiun prizorgas S-roj Tournel kaj Van Deun. Komence de Oktobro 1937, nia ano S-ro Jos. V. D. Eynde gvidis kurson, kiu konis grandan sukceson ĉe la aŭdantaro.

Kiel kutime ni kunlaboras al Espero Katoliko kaj ni insertigis kelkajn fotografiajn pri niaj kunvenoj kaj grupoj.

Kunlabore kun nia nederlanda fratinskcio, Nederlanda Katoliko, ni disvendis inte-

resan propagandan broŝureton « De spijker op de kop geslagen ».

Rilate la Internacian Eŭkaristian Kongreson en Budapeŝt, ni faris nian eblon por helpi al la kongresontoj, terti Esperanton.

Tiu raporto montras al vi ke nia Unuiĝo bone laboris, kreskis kaj antaŭeniris. Ni nun staras sur firme organizita bazo, el kiu ni profite povas plukonstrui. Plue, en nia Unuiĝo regas vera amika kaj sindona spirito, kiu kapablas tiel bone atingi la de ni antaŭviditajn celojn kiel venki la plej grandajn malfacilaĵojn.

La raporto finiĝis per alvoko al ĉiuj propagandi, labori kaj helpi la estraron.

Post la sekretario la kasisto raportis pri la kasstato. La aron de ciferoj kaj nombroj ni ne ripetos: je la fino ni aŭdis ke la kaso estas sana, kaj ĉar la financa flanko estas ege grava pro la antaŭeniro de nia movado, ni danke aplaudis la kasiston pro la bona mastrumado de niaj financoj.

Fine la vendestro skizis al ni la situacion de la vendinstituto. Li menciis kiel li humile komencis, transprenante la stokon de la sekretario kiu nur sumiĝis 2500 fr. dum la nuna momento montras al ni aktivon de pli ol 11.600 franka vendvaloro de libroj.

Post la transpreno la ciferoj regule altiĝis. Jen la rezultoj de la vendo:

de Majo ĝis Julio 1937	1900 fr.
de Aŭgusto ĝis Oktobro	2360 fr.
de Novembro ĝis Januaro 1938	4780 fr.
de Februaro ĝis Aprilo	4350 fr.

El tiuj ciferoj ĉiu povas konkludi ke la vendinstituto sufiĉe bone marŝas. En la lastaj monatoj ni starigis filialojn ĉe la grupoj.

La vendestro post tiu raporto estis longe aplaudata.

Ni fine priparolis kelkajn ĝeneralajn punktojn kaj post la preĝo ni disiris.

### Van ons Verkoopinstituut

**Wij vestigen er de aandacht op, dat op ons verkoopinstituut niet slechts ALLE Esperantoboeken verkrijgbaar zijn maar ook alle andere boeken.**

**Bestel dus altijd al uw boeken op ons instituut dat ALLES FRANCO ZENDT.**

**Bij de bestelling van een boek gelieve**

**men, zoo mogelijk, naam en adres van de uitgever te vermelden.**

**Noteer het adres van het verkoopinstituut: Egied Segerslaan 14, Wilrijk.**

## KION ALIAJ SKRIBAS?

**ONS GELOOF.** — En artikolo « De Vrijmetselarij » ni legas jenan frazon: Een bewijs voor de werkwijze der vrijmetselarij in Nederland biedt de nationaal-socialistische beweging van Mussert, waarin de vrijmetselaren Koster en Fahrweck leidende posities bekleeden, terwijl leden van de extramaçonnieke organisatie het filmwezen, de bioscopen, de Radioomroep, in handen hebben of machtig beïnvloeden, terwijl op geestelijk terrein de Vrij-katholieke Kerk, De Theosofische Organisaties e.d. het stempel der maçonnerie duidelijk vertoonen en de neutrale Esperanto- en padvindiersbewegingen de maçonnieke infiltraties zichtbaar uitdragen.

Ni recitas kaj pripensas.

**RENOVIGO** (*dulingva revolucia gazeto el Meksikio*). — En la ena parto de la koverto oni respondas al demandoj de legantoj. Unu abonanto el Varsovio demandas nedirekte pri la realeco de la religia persekutado en Meksikio. Fari tian demandon al revolucia gazeto estas jam iom naive.

La respondo estas: « la Meksika episkoparo preskaŭ ĉiam agadis kvazaŭ stabo de eksterlanda reĝo — la papo — ne kiel paca spirita gvidanto de samlandanoj, el tio la eterna konflikto, la senfinaj revenĝoj ». Atentu: oni ne diras kion fakte la episkopoj malbonfaris, kial oni silentas pri tio? Ke ili agadis kiel stabo de la papo, ne povas esti malutile al la lando, ĉar ĉu vi iam aŭdis ke tiu reĝo, la Papo, sin miksis en la politikon aŭ ekonomion de iu lando?

La artikolo poste diras ke « ekde Kardenas prezidantiĝis komencis brili la stelo de espero pri repaciĝo, ĉar li ne estas punema aŭ revenĝema, kaj lasas al ĉiuj la liberon kiun la leĝoj permesas ».

Kardenas lasas la liberon kiun la leĝoj permesas, sed kiun liberon permesas tiuj le-

ĝoj rilate al la praktikado de la religio? La leĝoj permesas iom aŭ nenion. Je la fino de la artikolo, oni demandas « ĉu estas eble kredi je « masakroj de katolikoj » aŭ je « religiaj persekutoj » pri kiuj la polaj kaj alilandaj gazetoj parolas? » Oni nur demandas sed ne donas respondon.

Feliĉe lastatempe la informoj el Meksikio sciigas ke Kardenas tre mildigis la persekutadon, kaj permesas la diservojn, ne praktikante la ekzistantajn kontraŭreligiajn leĝojn.

**JUNA IDEO.** — En artikolo pri « Aŭtoritateco » F. R. asertas ke oni estas nur aŭtoritatulo en fako kiun oni speciale pristudis; tiel kuracistoj koncerne medicinajn aferojn, historiistoj rilate al la historio, episkopoj estas nur aŭtoritatuloj en teologio kaj moralo kaj ne en aliaj aferoj.

Ni komprenas el tiu artikolo ke la Episkopoj ne parolu pri politiko, ĉar ili pri tio ne povas juĝi kaj ne studis tion, sed ke ili tamen kelkfoje faras tion.

Tio estas multe ripetata aserto kiun ne faras homo kiu studis KAJ teologion KAJ politikon, ĉar tiu scias ke ofte la politiko tuŝas la religion, ke ili ambaŭ kelkfoje tute intermiksiĝas. Vidu en Germanujo, ĉu tie la politiko estas pure politiko? Entute ne, la politikistoj tie transpasas la politikan aŭtoritaton. Kaj tiam la Episkoparo povas kaj devas protesti kaj intermiksiĝi en tiu religian politikon ĉar, kiel F. R. asertas, la episkopoj estas aŭtoritatuloj en religiaj aferoj kaj ili povas do juĝi kiam la politiko venas en religian kampon. Kaj kial la Episkoparo ne povas averti kontraŭ politiko kiu en aliaj landoj pruvis transpasi siajn limojn? Kiu estas pli aŭtoritatulo por juĝi ke iu politiko estas danĝera por la religio?

Trankviliĝu ĉiuj kiuj asertas ke la Episkopoj parolas pri politiko, ĉar la episkopoj estas sufiĉe aŭtoritatuloj en religiaj aferoj por scii kiam la politiko tuŝas aŭ estas danĝera por la religio, kaj ili estas sufiĉe saĝaj por ne intermiksiĝi en puran politikon.

Se Juna Ideo volas esti katolika kaj katolikiga revuo por la junularo, ĝi estu pli singarda rilate al la artikoloj kiujn ĝi akceptas.

**VOCOJ EL ORIENTO.** — *Nova gazeto aperanta en Hankow, kun la celo kontraŭbatali la japanan imperialismon.* — Estas

agrabla por ni Esperantistoj ke ni povas senpere informiĝi el la fremdaj landoj mem sed ĉu ni objektivite informiĝas estas alia afero. En la Marta numero ni legas ke ankaŭ en Korea oni preparas la ĝeneralan revolucion kontraŭ Japanujo.

En la artikolo interesa: « Kiu ridas plej laste, ridas plej bone » ni legas jenan frazon: « la multnombroco de nacioperfiduloj kaj la aktivado de la Trockiistoj ankaŭ estas granda baro, precipe la lastaj, kiuj servas kiel spionoj de japanaj imperiistoj por disrompi la liberigan batalon de Ĉinio el interne; ili intencas per tiaj belsonaj « maldekstraj », « revoluciaj » frazoj kiaj « nur per la forto de la proletaro Ĉinio povas venki Japanujon » kaj « Ĉinio devas ne nur kontraŭ Japanujo sed precipe por havi bonajn rilandojn » sufoki la unuecfroton kaj izoligi Ĉinion de aliaj paco subtenantaj landoj, Usono, Britujo kaj Francujo, kiuj nun povas doni helpon al Ĉinio kaj estas amikoj bezonataj de Ĉinio ».

**ORIENTA KURIERO.** *Alia revuo el Ĉinio kun sama celo.*

En artikolo « Nenia vera konflikto inter kristanoj kaj komunistoj » oni legas ke la komunista armeo, kiu nuntempe estas sub gvidado de la registara armeo, kun kiu ĝi kunlaboras kiel aparta armeo, nomata la Okvoja Armeo, favore ŝanĝis sian sintenon al la fremduloj. La komunista partio scias ke « la japana imperialismo hodiaŭ estas la nura malamiko de Ĉinio » kaj ke por venki tiun malamikon estas dezirindaj « la simpatio kaj ĉiu ebla helpo de la amikaj nacioj ». La komunistoj volas eviti konflikton kun la kristanoj ne nur por formi unuecfroton kontraŭ Japano sed precipe por havi bonajn rilatojn kun la fremdlandanoj, la misiistoj kaj iliaj nacioj. Tiun sintenon ili ankaŭ post la venko daŭrigos ili diras, ĉar ankaŭ tiam ili bezonas ankoraŭ teknikan kaj ekonomian helpon de la fremdaj landoj.

Por pruvi tiun favoran sintenon al la kristanoj « Ĉu Te, la komunista ĉefkomandanto, kondukis sian stabon al meso en katolika preĝejo, kaj faris paroladon en kiu li diris: estas nenia vera konflikto inter kristanoj kaj komunistoj en Ĉinio ».

La favora sinteno al la kristanoj estas do ne principa, sed nur provizora kaj bezonata. Ĝi estas la nova internacia komedio de la komunistoj, la politiko de la « popolfro-



te » kaj la « prezentata mano ».

Ni esperu ke Ĉiang Kaj-ŝek kiu jam la komunistajn bandojn submetis al la registara armeo, iom post iom ĉesigos la tutan komunistan partion kaj establos ŝtaton vere demokratian, en kiu regas veraj sinkompreno, sinamo kaj bonfarto.

LA LIBERECANA SINTEZO. *Nova gazeteto de la Iberia Anarkista Federacio, aperanta en Parizo.*

Estas kompreneble la ĉiam ripetata kanto de la ruĝuloj: la faŝistoj mortigas senkulpaĵajn infanojn, virinojn, la faŝistoj estas barbaroj ktp. Estas, kiam la komunistoj kaj anarkistoj parolas pri barbereco, kvazaŭ ili tiam konstante rigardas en la spegulo.

Ni citas artikoleton el tiu gazeteto, kiu eble estas utila por pripensigi nin katolikojn. La titolo estas: Esperanto kaj la Revolucianaro. Jen:

« Ankoraŭ estas multaj personoj, kiuj ignoras la ekziston de la internacia lingvo, kaj eĉ la plimulto el tiuj personoj, kiuj konas ĝin, ne komprenas la praktikan utilon de la lingvo sociala valoron.

« Ĉiuj anarkistoj havas la devon studi kaj disvastigi Esperanton revoluciele, ĉar, ja, la kapitalismo ankaŭ uzas tiun lingvon por torpedi la Revolucion.

« UEA kaj IEL estas organizaĵoj en servo de la reakcio. Ĉiuj iliaj membroj estas precipe komercistoj, industriistoj, financuloj kaj alispecaj ekspluatantoj de la proletaro. Dum la kongreso, kiu okazis en Graz (Aŭstrujo) en Januaro 1921, Espero Katolikika diris la jenon:

« « En ĉi tiu kongreso de Graz, ni devas organizi potencon armeon internacian, direktatan kontraŭ la forto de la Revolucio, kontraŭ la bolŝevika materialismo, kontraŭ la danĝera anarkismo, ktp. »

« Kiel estas konstateble, ne ĉiuj Esperantistoj estas progresemaj, kiel multaj kredas. Ankaŭ la burĝaro metas Esperanton en servo de la ŝtato por atingi sian celon.

« La revolucionaj junuloj devas entrepreni la lukton por la tutmonda lingvo, por ke la novaj generacioj povu interkonpreni, ĉar devas veni la tago en kiu malaperos la landlimoj; ĉiu fanatismo kaj falsaj sentimentoj, kiujn kapitalismo uzas per malŝatinda politiko por trompi la la-

boristajn amasojn, viktimoj de falsa edukado. Kiam tiu tago venos, ĉiuj naciaj lingvoj devas cedi lokon al nur unu lingvo komuna, kiu sendube estos Esperanto. « Revoluciaj junuloj faru ĉion eblan por la internacia lingvo Esperanto. Studu ĝin, diskonigu ĝin, organizante kursojn kaj gajnante adeptojn por nia Tutmonda Ligo de Esperantistoj Senŝtatanaj.

Ni miras ke Esperantista gazeto subtenas la falsan opinionon ke iam la naciaj lingvoj cedu kaj cedos lokon al Esperanto. *Malgraŭ tiu sensencaĵo la artikoleto instruas kelkajn katolikajn Esperantistojn pri la bezono de katolika Esperanto-organizo.*

## — Kanto Sanigas —

### EDEN-HEJMO (Hemelhuis)

#### I

Tra dom' mia ludas sunradi',  
Reĝo en la devo nun min sentas mi:  
mian familion laŭ la vivovoj',  
sur la brakoj portas mi kun ĝoj'.

#### II

Sola kruco staras sur kamen',  
Edzinet' anĝelo, hejm' estu eden'.  
Estu ja konsolo kaj mia fier',  
freŝaj vivofloroj sur la ter'.

#### III

Ho infanoj!  
Gojo en malriĉ'!  
Ĉu je granda ŝarĝo, malpli da feliĉ' ?  
Ĉu oni malsatus pro buŝeto pli ?  
Kie homoj luktas helpas Di'.

Tradukis J. V. Schoor. (El «La Najtingalo»)

Wilt ge steeds veel volk op uw vergaderingen? — Geef een uurtje FILM!

Het Katholiek Smafilm Studio van Antwerpen biedt U een interessante keuze van documentair- speel- en teekenfilms.

Specialiteit van reportages: 17e IJzerbedevaart. VI Nat. Zangfeesten. Pater Damiaanfeesten enz. Meer dan 600 referenties.

Vraag gratis uitgebreide geïllustreerde kataloog aan:

KATH. SMALFILM STUDIO, 32, OUDE BEURS, ANTWERPEN

### La plej rekomendindaj originalaj

#### verkoj en Esperanto

estas la verkoj de la plej populara esperantisto-verkisto:

#### JULIO BAGHY.

Ĉu por distro, ĉu por studo, ĉu por ekzameno, tutegale, liajn verkojn vi legu!

Jen la titoloj kaj prezoj:

	Bind.	Broŝ.
Preter la Vivo ...	Fr. 24.—	Fr. 17.—
Sur sanga tero ...	Fr. 58.—	Fr. 45.—
Verdaj donkijotoj	Fr. 34.—	Fr. 24.—
La vagabondo kantatas .....	Fr. 26.—	Fr. 16.—
La Verda Koro ...	Fr. 36.—	Fr. 16.50
Printempo en la aŭtuno .....	Fr. —.—	Fr. 12.—
Teatra Korbo .....	Fr. —.—	Fr. 13.—
Aliaj tre rekomendindaj libroj estas:		
Leerboek voor Esperanto, de D-ro F. Szilagyí .....	Fr. 11.—	
Ellernu, daŭriga kurso, de D-ro F. Szilagyí .....	Fr. 16.—	
Plena Gramatiko de Esperanto, de K. Kalocsay ...	Fr. 84.—	
Haveblaj ĉe nia Vendinstituto, D. Mortelmans, 14, Egied Segerlaan, Wilrijk. Poŝtĉekkonto N <sup>o</sup> 1194.82.		

## ĈIU ESPERANTISTO

nepre havigu al si la plej bonan verkon de nia fama verkistino

1<sup>a</sup>) MARIE KOENEN, el la ned. lingvo trad. de P. CH. M. v. d. Vijver: *La Sunkrono*. prezo: belgaj frankoj 13. — broŝ.; fr. 25. — bind.


El recenzoj: ... Maar als je eens goed Esperanto wilt lezen, dan kan ik je dit boek aanbevelen... (De Jonge Wacht). ... Bela nova libro kiu entenas bonege tradukitan rakonton... (La Praktiko). ... La Sun-

## Senpage!

vi ricevos senpage je la valoro de 15 fr. bonajn poŝtmarkojn de 15 diversaj landoj (laŭ la plej lasta katalogo de Yvert) se vi abonas la

## REVUO INTERNACIA

de poŝtmarkinterŝanĝo kaj Turismo



Gi aperas 8-foje ĉiujare, 20 - 30-paĝa, riĉe ilustrita, kaj donas regule kaj artajn suplementojn kaj pm-donacojn, kaj kronikon kompletan de la novaj eldonaĵoj, kaj la liston de la membroj.

ĈIU ABONANTO RAJTAS 5 INTERŜANGANONCOJN SENPAGAJN.

Abonprezo: 15 frankaj belgaj,

pagotaj per poŝtmandato aŭ banko al JOS. PHILIPPEN,

Botermarkt 10 DIEST

krono en Esperanto estas leginda, eĉ tre leginda libro... (N. K.) Kiel ekzemplo de alta nederlanda literaturo, certe rekomendinda verko (Flandra Katoliko).

2<sup>a</sup>) *La Najtingalo*, dua eldono. Plej ŝatata Esp. kantaro. La unua eldono finvendiĝis en tri tagoj.

..... mi ne povas ne konsili: tuj aĉetu ĝin kaj kantadu por ke la krizo cedu! (Radiaro). Prezo nur fr. 2,50.

Eldonis: Esperanto Instituto MALNOVA TURO, Eindhoven — Ned. Mendebla pere de nia filialisto D. Mortelmans, E. Segerlaan, 14, Wilrijk. P-konto n<sup>o</sup> 119.482.

# W. J. THIEME & K-io

en Zutphen (Nederlando)

## A) Stud-libroj :

### ESPERANTO-WOORDENBOEK.

(Esp. - Nederl. & Nederl. - Esp.)

Verkis A. G. J. van Straaten, gvidanto de la Centra Esperanto-Kurso en Nijmegen, membro de la Ned. Esp. Ekzamena Komitato.  
En bela bindo : Fr. 80.—

### BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK. (Esp.-Ned. & Ned.-Esp.)

de A. G. J. van Straaten  
En bela bindo : Fr. 40.—

### H. J. Bulthuis, LA JUNA KOMENCANTO.

La plej unua Esp-a legolibreto por kursoj kaj lernejoj (kun klarigoj). En tri partoj.  
1-a parto : Fr. 8,25 ; 2-a parto : Fr. 8,25 ; 3-a parto : Fr. 9.—  
Ĉi-tiuj tri sinsekvaj partoj (amplekso resp. 46, 51 kaj 54 paĝoj) estas uzablaj sen ia alia lernolibro, por hejma studado, kursoj k. t. p.

### H. J. Bulthuis, RAPIDE KAJ BONE.

Du legolibretoj (por infanoj), ĉiu ĉ. 60-paĝa, plenaj de belaj bildoj, destinitaj por infanoj. Ili estas tre rekomendindaj ĉie, kie infanoj lernas Esperanton. Prezo de unu parto : Fr. 9.—

### H. J. Bulthuis, LA JUNA ROBINSONO.

Legolibro kun klarigoj, tre taŭga por junaj Esperantistoj, kiuj intencas poste legi la grandan libron « Robinsono Kruso ». 50 paĝoj kun multaj bildoj. Prezo : Fr. 10.—

### H. J. Bulthuis, ROBINSON KRUSO.

Legolibro por geknaboj, laŭ Campe. 3-a eldono. Bindita. Kiel « La Juna Robinsono », sed kun pli vasta kaj malpli facila teksto. Kun ilustraĵoj kaj parol-ekzercoj.

Prezo : Fr. 32.—

### W. W. van Alphen, ESPERANTO.

Lern- kaj lego-libro por la uzado en lernejoj, kursoj kaj privata studado. Bindita.  
Prezo : Fr. 28,70. Slosilo al ĝi : Fr. 10.—

### Glück & Willems, LA VERBO EN ESPERANTO.

Teorio kaj praktika uzado Prezo : Fr. 10,70

### M. de Waard, HET ESPERANTO-A EXAMEN.

Lern- kaj ripetlibro por daŭrigaj kursoj kaj stud-rondoj.  
Prezo : Broŝ. Fr. 15,60 Kart. Fr. 19,70.

### M. de Waard, HET ESPERANTO B-EXAMEN.

Lern- kaj ripet-libro por daŭrigaj kursoj kaj stud-rondoj.  
Prezo : Broŝ. Fr. 45,10. Kart. Fr. 53,30.

### M. de Waard, DEMANDARO KAJ RESPONDARO.

pri la historio de la Esperanto-Movado.  
Prezo : Broŝ. Fr. 23, — Kart. Fr. 26,25.

### M. de Waard, EEN VERZAMELING ESPERANTO SPREEKWOORDEN EN ZEGSWIJZEN.

500 nederlandaj proverboj kun la korespondaj Esp-aj proverboj. Kun indekso de la vortoj.  
Prezo : Fr. 14,75

### P. J. Soeters, MIA LERNOLIBRO.

Practische methode voor Esperanto.  
Prezo : broŝ. Fr. 19,70. Kart. Fr. 23.—

### J. J. Rozendal, MI PAROLAS ESPERANTON.

Ekzercoj de lego, traduko kaj parolo, por kursoj, lernejo kaj hejma lernado.

Prezo : Fr. 14,75.

## B) Literaturo :

(Bonaj libroj kun grave malaltigitaj prezoj).

### H. J. Bulthuis, KRESTOMATIO.

Simpla legolibro kun klarigoj ; entenas fragmentojn el pluraj Esp-aj romanoj k. t. p. Tre taŭga por tiuj, kiuj jam legis la libron « Robinsono » kaj volas plu progresi en Esperanto. Ĝi donas ankaŭ rigardon super la ekzistanta Esperanto-literaturo.

Antaŭa prezo : Fr. 57,40 broŝ. ; Fr. 69,70 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 40,— bind.

### \* H. Conscience, LA LEONO DE FLANDRUJO.

El la flandra ligvo tradukis H. J. Bulthuis. Rekomendita de la Esp-ista Literatura Asocio.

Antaŭa prezo : Fr. 53,30 broŝ. ; Fr. 61,50 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

### Charlotte Brontë, JANE EYRE.

El la angla lingvo tradukis H. J. Bulthuis, ano de la Esp-ista Lingva Komitato.

Antaŭa prezo : Fr. 86,10 broŝ. ; Fr. 96,75 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

« La bela esperanta traduko pruvas, ke la tradukinto majstras la mondlingvon. Tial ĝi plene meritas esti legata kaj pristudata ». (Kath. Schoolblad).

### Hendrik Ibsen, IMPERiestro kaj GALILEANO.

Mond-historia teatraĵo, tradukita de H. J. Bulthuis L. K.-ano. Rekomendita de la Esp-ista Literatura Asocio.

Antaŭa prezo : Fr. 57,40 broŝ. ; Fr. 64.— bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 32,80 bind.

### \* J. v. d. Vondel, GIJSBRECHT VAN AEMSTEL.

La detruo de la urbo kaj lia ekzilo. Frage-

dio. El la nederlanda lingva originalo tradukis Ir. J. R. G. Isbrücker, membro de la Esp-ista Akademio.

Antaŭa prezo : Fr. 32.— broŝ. ; Fr. 41.— bind.

Nuna prezo : Fr. 16,40 broŝ. ; Fr. 24,60 bind.

« Cervantes en sia verko « Don Quijote » komparas la tradukaĵon kun la dorsa flanko de la teksita tapiŝo ; oni ja rekonas la figurojn de la teksto, sed ĉie elpendas faden-finaĵoj. Sed ĉe tiu ĉi tradukaĵo ne trafas la komparo de Cervantes : malgraŭ la malfacilaĵoj ; kiuj trudigis al la tradukanto, la libro staras sur la nivelo de la originalo, la famaj horoj vekas la saman impreson de kortuŝa simpleco, kiel en la originalo ».

(Weekblad voor Gymn. & M. O.)

### \* Homeros, ODUSSEIAS.

El la antikva greka lingvo tradukis W. A. J. Manders.

Antaŭa prezo : Fr. 64,— broŝ. ; Fr. 76,25 bind.

Nuna prezo : Fr. 24,60 broŝ. ; Fr. 34,50 bind.

« S-ro Manders per ĉi-tiu traduko pruvas la grandan riĉecon kaj flekseblecon de la belsona Esperanto. Ĝi precize redonas la plej delikatajn nuancojn, kaj oni havas la impreson legi la originalan tekston de la senmorta eposo de la granda greka poeto. Oni ne povas sufiĉe varme rekomendi la libron ». « Het Laatste Nieuws, Brussel ».

La libroj signitaj per steleto estas en la listo de tiuj libroj, el kiuj la kandidatoj por la B-ekzameno devas legi almenaŭ 4 librojn.

La supre menciitaj libroj estas aĉeteblaj ĉe la Vendinstituto de F. U. K. E., D. Mortelmans, 14, Egied Segerslaan, Wilrijk. Poŝt-ĉekkonto n° 119482., kiu estas la filialisto por Flandrujo de la Firmo W. J. Thieme & Co, Zutphen.

La libroj estas sendataj afrankite.



**VIEUX SYSTÈME**  
**'t wit Stoopke.**

ET. JACQUES NEEFS ANTWERPEN.  
ANVERS.

° **RADIARO** °

LINGVA GAZETO KATOLIKA

Monata eldono, 18-paĝa, eldono de  
**Katolika Esperanto Instru-Centro**

JARABONO : 1,75 NED. GULD.  
Adm. J. Dercks, Antwerpschestraat, 43  
BERGEN-OP-ZOOM (Nederland)

Provnumeron ni sendas senpage.  
(Ciumonate abonebla).

FLANDRAJ  
ESPERANTISTOJ



EN ROESELARE  
ESTAS LA DE VI  
PREFERATA

**PRESEJO**

**H. & H. BRAEKEVELT**  
Statiedreef, 177 - Tel. 1080


Iedere groep, vereeniging of zaken-  
man gebruike vóór elk order onzen  
dienst voor inlichtingen en schetsen.

**Specialiteit :**  
**ESPERANTO - DRUKWERK**

**Imperial**

Schrijfmachienen zijn de beste

Engelsch



Fabrikkat

Bureelmodel & draagbaar model  
ROESTVRIJ

Het meest MODERNE Schrijfmachien  
2 JAAR WAARBORG

Eerste klas schrijfflinten voor alle merken van  
schrijfmachienen & rekenmachienen. - Ellam's  
carbonpapier - Ellam's duplicatoren,  
stencils en inkten.

Bijzonder werkhuis voor herstellingen aan alle  
schrijf- en rekenmachienen.

**TOBIE DE PRINS** Tel. 216.20

● 32, Kathelijnevest, ANTWERPEN ●